# *Restarigo de la metroo kaj aliaj transportiloj post la sabotoj kontra? la elektroenergetika reto.*



Karakaso, 14 mar (RHK) La? raporto de la informagentejo Prensa Latina, estis restarigita la servo de la metroo de  tiu ?i urbo, plus aliaj similaj transportiloj en aliaj urboj de Venezuelo. Ili estis interrompitaj dum tuta semajno ka?ze de la konstanta sabotado al la tutlanda elektroenergetika reto.

Post efektivigi la koncernajn kontrolojn en la elektraj sistemoj, la prezidento Nicolás Maduro rajtigis la reaktivadon de operacioj de la metrooj kaj fervojoj de la urboj Karakaso, Los Teques, Marakaibo kaj Valencia, informis la prezidanto de la konstitucia nacia asembleo, Diosdado Cabello.

Proksimume tri milionoj da personoj uzas ?iutage la ?efan transportilon de la venezuela ?efurbo. La restarigo de la servo koincidas kun la rekomenci?o de laboraj kaj edukaj aktivecoj, post esti komplete restarigita la elektra provizo en la tuta lando.

Ekde la pasinta 7-a de marto, okazis kelkaj sabotoj fizikaj kaj teknologiaj por malebligi la restarigon de la tutlanda elektroenergetika sistemo, kaj tial la venezuela registaro respondecigis la sektorojn de la opozicio subtenataj de Usono, kiu malferme deklaris la intencon detrui la bolivaran registaron de Nicolás Maduro, kiu estas la prezidento elektita dum la ?eneralaj elektoj en 2018.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/185806-restarigo-de-la-metroo-kaj-aliaj-transportiloj-post-la-sabotoj-kontrau-la-elektroenergetika-reto

**Radio Habana Cuba**